# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 36ª jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj


http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k128/k128.html

*Estas pli da aferoj ol tio, kion la okulo vidas*

Pretera kongreso

La milito de paĉjo

Julion la 27an



Geronsenbergoj

Saluton, vera korpo!

Jen baloto mia!

Nº 128ª

Julion de 2023

*Kajeroj* *el la Sudo*

*Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

*Calle Jabonerías, 6.3º D*
*30010 Murcia*
*Hispanio*

# Enhavo

**Redaktore**: Kial baloti?.................3
La milito de paĉjo.................................4
Ave verum corpus.................................7
Preterreala kongreso.............................9
Prezidonto 1ª.......................................10
Prezidonto 2ª.......................................11
Prezidontino 3ª....................................12
Prezidonto 4ª.......................................13
Gerosenbergoj......................................10
Finaj franĝoj.........................................12
Necesa defendo....................................16
Julion 23an..........................................19

ISSN 1886-1938 (printita)
Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo mistraktas neniun personon.**

**Kovrilo**: Nunaj politikistoj hispanaj ne meritas pli ol nebaloto. **For la reĝimo!**

Tamen, se vi konsideras, ke vi devas baloti, **konsultu** la koncernajn politikaj **programojn** ĉe nia lasta paĝo.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Se vi deziras kontibui per aliĝo, kontaktu la redaktoron: kajeroj@gmail.com



**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj: **Scribus**, **Bluefish**, **BlueGriffon**, **Gimp**, kaj **Cyberduck**.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Redaktore

# Kial baloti?

De pli ol kvardek jaroj politikistoj petegas de ni, ke ni balotu, eĉ se ne al ili mem, sengrave al tio, kiun partion oni balotas, kondiĉe, ke oni balotu. Ĉu tio ne estas suspektinda?

Sed se oni rigardas la Hispanan Konstitucion de 1978ª, oni trovas la solvon ĉe ties artikolo 6ª, kie oni povas legi, ke la maniero per kiu civitanoj povas partopreni en la politika vivo de la lando estas per partioj politikaj, kies fermitajn listojn faras la gvidantoj de la koncerna partio. Pro tio ili blekas ĉiu jarkvaro por tio, ke oni balotu. Sed tio signifas, ke oni akceptas, ke regu la prezidanto nomumita de la Parlamento, nome tiu, kiu gajnis plej grandan nombron da deputitoj. Kaj tio estas troigo, ĉu ne?

Eble oni trovas tion normala, kaj tia estus, se oni dirus, ke oni vivas en partitokratio, tio estas, regado de politikaj partioj, sed oni ade diras, ke oni vivas en demokratio, nome, regado de la popolo. Sed se popolano ne eniras politikan partion, la popolo regas nenion. Kaj se popolano eniras la partion kaj venkas parlaentan sidlokon, la deputito ne reprezentas la popolon, sed sian partion... Kaj tio estas trompo, kaj kondutas el korupteco.

Deputitoj decidas la kvanton de sia salajro, kaj ankaŭ sian kotizon al sociala asekursistemo. Kaj tio estas kial humila mileŭristo pagas pli altan procentaĵon de sia salajro kiel imposton ol deputito, kiu ricevas trifoje — ofte kvinoble pro diversaj aliaj konceptoj— pli altan salajron.

Se popolano simpla kontraŭas leĝon, rapide juĝisto povas sendi lin aŭ ŝin en karceron, aŭ ricevas monpunon. Sed deputitoj havas *aforamiento*n (tio estas, jurprivilegion), kio signifas, ke se juĝisto suspektas, ke li aŭ ŝi krimis, oni devas peti specialan permeson de la parlamento hispana por ke tiu persono ricevu juĝan procedon. Konsiderante, ke la Prezidento havas la plejgrandan kvanton da deputitoj en sia partio, tio signifas, ke Prezidento povas fari ion ajn sen ricevi punon, ĝis kiam li aŭ ŝi ne plu estos prezidento. Sed eble la koncerna krimo jam preskriptiĝis. Sekve, oni ne povas kontroli la Prezidenton en Hispanio. ankaŭ ne la Parlamenton, ankaŭ ne la jugistojn mem, ĉar ilin nomumas la Parlamenton.

Do, pro tio ke la prezidento, parlamento kaj ia ajn povo en Hispanio ne reprezentas min, mi ne balotos. Kaj mi invitas vin fari same. **Vivu respubliko konstitucia!**

Sekcio

# La milito de paĉjo

Ŝajnas, ke ni jam estas en la Milito Monda. Ne je la Unua, ne je la Dua, sed *je la Tria estas la venkita*, diras fama proverbo hispana... Kaj venkataj ni estos, certe.

Unue pri la vero. Due pri ekonomio, kaj trie, eble pri detruo atoma. Oni diras, ke Usono uzis atombombon en la milito de Irako, kaj pro tio ili venkis tiom facile: malaperinte la armeon irakan, ne estis problemo por la soldatoj usonaj konkeri la landon. La problemo nun estas, ke se rusa armeo uzas atombombon, Ukrainion ili konkeros tiom facile. Pro tio Usono ne volas sendi siajn soldatojn tie. Ŝajnas, ke Ukrainio provizas la mortotojn, kaj Usono aŭ Eŭropo provizas la militon. Kaj laŭ mi tio estas malmorala, maljusta kaj maldemokratia: *ĉion por la popolo, eĉ kontraŭ la popolo*, ĝisdatante faman hispanan frazon (todo para el pueblo, pero sin el pueblo: *ĉio por la popolo, sed sen la popolo*, kiu estis la batalkrio de klerismuloj je la 19ª jarcento, kiam la ideojn de la franca revolucio estis adoptataj en Hispanio inter la klerisma kasto eble ĉar ĝi ignoris kiom da sango ili kaŭzis en la najbara nacio.

Ne, Usono ne plu deziras katastrofon denove, simila al tiuj, kiuj okazis en siaj militoj de Vietnamio, Koreujo aŭ Afganio, dum kiuj multaj usonanoj mortis, pro tio, ke ili ne havas bonajn generalojn,



kiel McCarthur aŭ Patton. Sed eĉ se ili ilin havus, bonaj rezultoj en moderna milito ne plu kuŝas sur bona strategio aŭ milita sperto, sed sur teĥnologio de morto, kaj ili ne scias, ĉu Rusio havas egalvaloran maŝinaron kaj sciencan avantaĝon kiel ili, do ili ne riskas siajn soldatojn, ĉar ili havas familianojn, kiuj voĉdonos poste, kaj la misfaroj de Prezidento povas doni povon al alia grava partio usona. Partio, kiu neniam provokintus tiun militon.

Mi iam pensis, ke la imperio usona estas pli valora ol tiuj el la pasinto, ĉar ili ne subpremas konkerintojn kaj ne okupas ties landon, kiel aliaj imperioj faris pasintece, sed pristudante pri la Hispana Imperio, mi konkludas ke neniu alia imperio, eĉ usona,

valoras eĉ dek procento ol tiu hispana konsiderante la bonajn aferojn, kiujn hispanoj faris en Ameriko kaj Oceanio: universitatoj, hospitaloj kaj ŝoseoj. Kiam Usono venkis Hispanion je 1898a kaj sekve forrabis la restantan imperion hispanan, ili mistraktis indianojn —fakte genocidis ilin en Nordameriko—, malestimis Kubon kaj kubanojn— ili nomis la insulon *nia postkorto* — kaj persekutis la uzon de la hispana lingvo kaj kulturon, inkluzive de la religio katolika en Filipinoj —male al tio, kion faris hispanaj monaĥoj, kiuj verkis gramatikojn de surlokaj lingvoj, kaj uzis ilin disvastigi siajn kulturon kaj religion inter indianoj—, kaj oni povas do aserti, ke la veraj perdintoj de tiu milito estas Kubo, Portoriko, Filipinoj kaj Gŭam', inter aliaj posedaĵoj hispanaj en la Pacifika Oceano. Sed banditoj kaj teroristoj malbonfartigis usonanojn en Filipinoj kaj kelkaj aliaj landoj invaditaj, kaj ili ne deziris ekloĝi tie. Tio kontraŭstaras la ekloĝadon trijarcenta de hispanoj en Ameriko, tiel ke ties praidoj amis sian landon tiel, ke ili kredis, ke ili indiĝenas de tie, kaj sekve deziris sendependiĝi de Hispanio reagante al sirenkantoj de angloj—, sen konsideri, ke nek ili mem estis usonanoj, nek Hispanio estis Britio. Pro tio baldaŭ post la sendependiĝo de Sudameriko, la angloj forprenis multe pli da oro en kelkaj monatoj el la hispanoj dum tri jarcentoj, lasante surloke nenion, kontraŭe al la restaĵoj hispanaj, nome universitatoj, hospitaloj kaj ŝoseoj... Fakte en Portoriko nun estas malpli da tiuj lastaj ol dum la hispana rego.

Pro tio la imperio usona estas —britstile, ni vidu— mona kaj ekonomia kaj ne politika.

Ne, hegemonii la mondon mone estas pli malmultekoste ol okupi foran landon, kaj oni povas vidi tion pri Germanio: dum jardekoj la armeo de Usono okupis parton da ĝi, kaj poste la armeo forlasis ĝin kaj lasis la germanojn mem zorgi pri sia lando kun kondiĉoj: la politika kasto regas sed reprezentas ne la popolon, sed la interesojn de Usono. Nun Germanio estas la plej grava lando en Eŭropo, kaj per sia hegemonio ĝi servas la interesojn de Usono. Pro tio Eŭropo estas en la **Milito de Paĉjo**, —Usono aŭ Biden, vi elektu—, tiel ke Usono ne riskas usonajn vivojn sur tiu milito nuna, ukraina milito. Ĉu ni hispanoj devas partopreni iel ajn en tiu sensenca milito? Laŭ mi tio estas sufiĉa kialo forlasi la Eŭropan Komunumon kaj NATOn mem. Jes, eble ni havos problemojn kun Maroko, sed ili solviĝos per malpli da kosto ol se ni enmiksiĝas en milito kon-

traŭ Rusio, kiu ĉiam estas amiko nia. Fakte ni neniam militis kontraŭ Rusio, sed ni jam spertis militon kontraŭ Usono, kiun tiu lasta komencis pere de mensogoj kaj troigoj.

Simile al tio, kio okazis en Germanio, kiam Diktatoro Franko mortis, Usono dezegnis *tian ĉi Demokration*, kiun oni diras, ke ni ĝuas. Nome: ke la deputitoj ne reprezentas la popolon, sed la interesoj de Okcidento, tio estas, Usono. Do tio —laŭ mi— estis pli grava malvenko ol tiu de 1898ª: tiam Usono akiris nur pecojn da lando, sed realo konstatigis al ili, ke tio estas multekosta. Jam la angloj montris al ili —per sia perfida agado en Sudameriko— ke estas multe pli profitinde aĉeti tutan politikan klason indiĝenan, tiel, ke ili agos profite al usonaj interesoj. Kaj la armilo ne plu estis pafiloj aŭ tankoj, sed mono. La artikoloj 6ª de nia konstitucio —notu, ke oni diras, ke ĝi estas kopio de la Germana konstitucio— diras, ke la suverenecon de la lando havas politikaj partioj, sed ne la civitanaro; dum artikolo 99ª diras, ke ne ekzistas sendependeco inter la leĝodona kaj la ekzekutiva povoj. Eble ili hontis dependigi la juĝan povon, sed pri tio jam zorgis la socialisma partio sen opono de la aliaj, kiuj ankaŭ deziras parton de la kuko por si mem, se ili iam atingas povon, kaj tion jam montris PP (cinika nomo, Popola Partio, kiu tute ne zorgas pri la popolo). Ververe kaj la socialisma kaj la popola ne estas maldekstra aŭ dekstra partioj, sed socialdemokrataj, kaj tio signifas, ke ili regas dorse al la popolo, kaj serve al la interesoj de Usono, kiun oni eŭfemisme nomas Okcidento. Tamen ni, hispanoj, ne estas germanoj. Ni ne malvenkis militon, kiu Usono venkis por ni, kaj sekve ni ŝuldas nenion bonan al Usono, kaj ankoraŭ Usono ŝuldas al ni multe da mono: tiun, kiun ili deprenis de ni post la milito, kiun ili kaŭzis je 1898 pro falsaj akuzoj, kaj ankaŭ tiun monon, kiun ili agnoskis, ke ili ŝuldis al ni kiam la hispana armeo gvidata de Bernardo de Gálvez venkis la batalon de Pensacola je 1781. Se oni aldonas la valuton de la inflacio de post tiom da tempo, Usono ŝuldas al ni multaj milionoj da dolaroj. Tamen kaj politikistoj kaj komunaj civitanoj nun estas allogitaj de mono kaj komforto, kaj necesas granda dozo da digneco kaj kono de historio regajni liberecon kaj institucii veran demokration en Hispanio.

Sekve ni diru denove: **Ne al** tiu sensenca **milito** de Paĉjo!

Muziko

# Ave verum corpus

*Ave verum corpus* estas unu el la plej famaj kaj emociplenaj muzikaj verkoj en klasika muziko. Ĝi estas preĝo verkita fare de la genia komponisto Wolfgang Amadeus Mozart je 1791a. Kvankam la komponaĵo estas mallonga, ĝi portas profundan religian signifon kaj emociplenumon, kiu ekscitas la koron de aŭskultantoj tra sia bela muzika esprimo.

La verko *Ave verum corpus* estis komponita dum la lastaj monatoj de la vivo de W. A. Mozart'. Ĝi estis verkitaj kiel parto de lia laboro por la koralo ***Pia eterna regno*** por la festa ceremonio en la sanktejo de Baden. La vortoj *Ave verum corpus* (Saluton, vera korpo!) estas prenitaj el la komenco de la eŭkaristia katolika rito, dum kiu ĝi devas esti kantata, laŭ la intenco de la aŭtoro.

La muzika strukturo de la kanto estas simpla kaj eleganta. Ĝi estas skribita por koruso, kvarteto de strunkordo kaj baso-solo. La muzika temo estas malpeza kaj flua, kun dolĉa kaj tenera melodio, kiu akompanas la tekston. La aranĝo de la voĉoj estas gracia kaj harmonia, kun subtileca interkantado de la koncernaj voĉoj.

Ĝi esprimas profundajn religiajn sentojn kaj adoron al la korpo de Kristo, kaj kreas etoson intima kaj sincereganta, humila kaj adoroema fare de la ĉeestantoj. La emocio en la muziko estas transdonata per la kombino de la koruso, la solvoĉoj, kaj la subtilaj dinamikaj kaj tempaj ŝanĝoj.

La efiko de *Ave verum corpus* estas emociiganta kaj spiritema sur la aŭskultantoj, kies koron kaj la animon ĝi kaptas, movante ilin je profunda religia kaj spiritoplena manieroj. La muziko emigas momentan konsenton kaj pacon al la spirito, kaj povas evoki fortajn emociojn, inkluzive de meditado, adoro, kaj enketo. Eble pro tio la disvastigo de tiu ĉi kanto transpasas jarcentojn, kaj ĝi restas ŝatata en la klasika muziko kaj plie, trairante la scenariojn de profana kantarto. La verko sekve oni ofte elektas por prezenti kaj interpreti en diversaj ceremonioj gravaj. Ĝia muzika beleco kaj profunda religia signifo kaptas la animon de la aŭskultantoj kaj transdonas sentojn de pieteco, respekto, kaj spiritaj altiĝoj.

Konklude, *Ave verum corpus* de majstro Mozart estas tre signifoplena komponaĵo en la klasika muziko. Ĝi ne nur montras la genion de sia komponisto, sed ankaŭ esprimas profundajn religiajn kaj spiritemajn sentojn. Tra sia simpla kaj bela muzika esprimo, la verko kaptas la koron kaj animon de la aŭskultantoj, prezentante profundan adoron kaj humilecon al la korpo de Kristo.

Se oni deziras kanti ĝin, ni montras la originalan kaj esperantajn vortojn, por ke oni povos tion fari komprenante:

| | |
|---|---|
| Ave verum Corpus | Saluton, vera korp' |
| Natum de Maria Virgine | naskita de Mari' virgulin' |
| Vere passum immolatum | Vere ofera paŝo |
| In Cruce pro homine | sur la kruco por homo |
| Cujus latus perforatum | kies flanko trapikiĝis |
| Unda fluxit sanguine | onde fluis sango. |
| Esto nobis praegustatum | Estu preta pro ni |
| In mortis examine | en ekzamen de morto, |
| O dulcis | Ho, dolĉa |
| O Pie | ho, pia |
| O Jesu Fili Mariae | Ho Jesu' fil' de Mari' |
| Miserere mei | kompatu min, |
| Miserere mei, mei | kompatu min, min |
| O dulcis | Ho dolĉa |
| O Pie | Ho pia, |
| O Jesu Fili Mariae | Ho Jesu', Filo de Mari' |
| Miserere mei | Kompatu min |
| Miserere mei, mei | Kompatu min, mi |
| Amen | Amen (estu tiel). |



Pensigo

# Preterreala kongreso

Antaŭ kelkaj tagoj mi ĉeestis la kongreson ***Más Allá 8$^{a}$*** (*Preter tie*), kiu daŭris nur tagon kaj duono: sabaton 10$^{an}$ kaj dimanĉon 11$^{an}$. La celo de la kongreso estas mistero, kaj per tio, oni komprenas Neidentigitajn Objektojn Flugantajn (hispane dirite OVNIs), mortintojn kaj nemortintojn (vampirojn), kaj ĉian alian aspekton de realo nedifinita.

La kongreson organizas Antono Pérez kaj Jozefo Antono Martínez de antaŭ pli ol 10 jaroj (ĉiun jaron krom tiuj pandemiaj), direktoroj de la programo ***Némesis*** en Radio Inter, alidirite Kanalo 8$^{a}$.

La unuan prelegon diris Jesuo Kaĝeĥo, sufiĉe konata komunikisto, kiu estas fama pro siaj rakontoj finaj aperante en programo de radioĉeno SER (hispana societo de radiodisvastigo) ***La escóbula de la brújula*** (*la balailo de la sorĉistino*, laŭ netradukebla vortludo); kaj temis pri la solvo per sciencaj rimedoj de historiaj enigmoj, kiel ekzemple kiel mortis Tutankhamon, aŭ ĉu Kristoforo Kolombo estis hispano ĉu italo.

Interesaj estis ankaŭ la prelegoj pri vampiroj kaj tio, kio atendas nin je *la alia flanko* de la morto, diritaj de Lorenzo Fernández kaj Laura Falko' respektive. Ili du ankaŭ kondukis sian programon ***La nevidebla Kolegio*** de la kongresejo mem, kiun ili elsendas regule per radio **Ondo Nula** ĉiun semjanon, kaj kiun oni




povis aŭskulti per tiu ĉeno la 22$^{an}$ de junio 2023$^{a}$.

Alia grava ero estis la rakonto de S-ino **Próspera Muñoz**, kiu spertis **rendevuon kun du eksterteranoj** en sia bieno en urbeto Jumilla (pron Ĥumilja) je 1947$^{a}$, dum kiu ili donis al ŝi gravan mesaĝon por homaro.

La kongreso estis sufiĉe grava kaj interesa, kaj la prizorgantoj jam anoncis la ekorganizon de la 9$^{a}$ eldono por junio 2024$^{a}$.

Legu pli ĉe ties retejo:

**http://www.kongresomasalla.com**



# Prezidonto 1ª Alberto Núñez Feijoo

Balotado

## Ĉu vi jam legis la Programon de Popola Partio?

**112 paĝoj.**

Nur unu el ili 4 gvidos la registaron de Hispanio la venontan jarkvaro ene de ĉi tiu reĝimo nedemokratia. Ĉu ni prifajfos? Mi klarigos tuj post la balotado de miaj senkonsciaj kuncivitanoj...




# Prezidonto 2ª Pedro Sánchez Castejón

Nur unu el ili 4 gvidos la registaron de Hispanio la venontan jarkvaro ene de ĉi tiu reĝimo nedemokratia. Ĉu ni prifajfos? Mi klarigos tuj post la balotado de miaj senkonsciaj kuncivitanoj...




Nur unu el ili 4 gvidos la registaron de Hispanio la venontan jarkvaro ene de ĉi tiu reĝimo nedemokratia. Ĉu ni prifajfos? Mi klarigos tuj post la balotado de miaj senkonsciaj kuncivitanoj...



# Prezidonto 4ª Santiago Abascal Conde

Balotado

## Ĉu vi jam legis la Programon de Partio VOX?


177 paĝoj

Nur unu el ili 4 gvidos la registaron de Hispanio la venontan jarkvaro ene de ĉi tiu reĝimo nedemokratia. Ĉu ni prifajfos? Mi klarigos tuj post la balotado de miaj senkonsciaj kuncivitanoj...

Pensigo

# Gerosenbergoj

Hodiaŭ, la 19an de junio de 2023a, jam estas 70 jaroj de la tago, kiam oni mortopunis la geedzojn Rosenbergojn pro perfido al sia patrio pro komuniki al Sovetunio informadon necesan por fari atombombon, komencante tiel la *Malvarma Milito*.



Ethel kaj Julius Rosenberg

Oni povas proklami sian kondamnon al mortopuno, kaj certe je la plejmulto de la ŝtatoj de tiuj Unuiĝintaj, Usono, la mortopuno ne plu ekzistas, sed eble multaj niaj legantoj ne scias, ke tiu puno ankoraŭ ekzistas pri federaciaj krimoj eĉ hodiaŭ laŭ la tuta lando.

Tuj post la fino de la Dua Mondmilito, oni timis, ke ekokazos la Tria, inter Usono kaj Sovetunio, kaj la koncernaj aliĝintoj de ili du. Cirkaŭ la fino de la milito Usono sukcesis krei la unuan atombombon, kaj Prezidento Truman decidis eksplodigi ĝin sur du urboj japanaj, anstataŭ montri ĝian povon en senpopolata insulo aŭ teritorio sufiĉe proksime al Japanio, por ke japanoj vidos la potencon kaj decidu kapitulacii, tiel, kiel kelkaj sciencistoj petis de li.

Tiun bombon havis nur Usono, sed kelkajn monatojn poste Sovetunio komunikis Usonon, ke ankaŭ ili jam havas ĝin. Oni enketis, kaj trovis, ke frato de Ethel Rosenberg laboris por la projekto Manhatan —kiu poduktis la atombombon— kaj ŝi kaj sia edzo povintus transdoni informon al Sovetunio pri tio. Sekvis juĝo kontraŭ ili, kaj oni trovis ilin kulpaj pri perfido kaj spionado favore al Sovetunio, ĉar ili estis komunistoj kaj anoj de la komunisma partio de Usono.

Ili estis mortopunataj per elektrika seĝo la 19an de junio de 1953a je la prizono de Sing Sing (proksime de Novjorko),

ekzakte 70 jarojn antaŭ la tago, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon. La edzo, Julius Rosenberg, mortis tuj post la elektrika malŝargo, sed ŝi bezonis kelkajn, kaj ne mortis facile.

Oni povas diskuti hodiaŭ pri la krueleco de mortopuno, kaj ĉu senkulpulo estas murdita de ĵura sistemo pro falsaj aŭ eraraj pruvoj, sed oni komprenu ankaŭ, ke tiutempe estis multe da timo al komunismo, kiu okupis la plej grandan landon en la mondo de kelkaj jardekoj, kaj minacis la ceteran mondon preni ilin sub sia povo pere de sangaj militoj, kiel okazis en Rusujo je 1917.

Alia diskutotemo nuntempa estas, ĉu la geedzoj Rosenberg mem ne kulpis pri tio, kion oni priakuzis ilin, kaj fakte ili neis tion ĝis sia morto. Tamen la Brita Enciklopedio akceptas la konkludon de la ĵurio, same kiel ĉiuj siatempe, kaj neniu ankoraŭ pruvis, ke ŝi kaj sia edzo estis vere senkulpaj; sed iliaj sep apelacioj malsukcesis, kaj Prezidentoj Harry S. Truman kaj Dwight Eisenhower rifuzis la prezidentan pardonon. Ĉu oni volis ekzempligi aliajn spionojn per tiu dureco? Sed vere la afero temas pri kulpo, ne dureco. La afero doni la plej danĝeran armilon al malamiko estis nepardonebla afero, ĉu ne?

Ĉiukaze oni nun pensu pri la afero, ĉu estus pli bone vivi eterne en prizono, ĉu fini rapide en elektrikseĝo.

Tamen, el pacisma vidpunkto, esas domaĝe, ke okazis tiuj mortigoj, kaj ĉefe, ke atombombon oni necesis ne daŭrigi militon inter Usono kaj Rusio tiutempe, kaj tiurilate, la agado de tiuj, kiuj donis atombomban informadon al Sovetunio eble protektis la mondon kontraŭ pli kruela milito inter okcidento kaj oriento, kiuj eĉ sen atombombado certe regresigus la mondon tiel, kiel ni ne komprenus nun. Pro tio oni konsideris la atombombon *La bombo de Paco*, ĉar neniu kuraĝis uzi ĝin la unuan, kulpiĝante sekve pri la detruo de nia mondo.

Kaj tamen la planedo same orbitadus sian stelon same kiel ĝi faris jam de 4500 miliardoj, tute senĝene kaj sen la speco, kiu konsideris sin inteligenta: certe kiam la surfaco tera estis magmo, ĝi estis malpli konvena al ekzistado de plantoj kaj bestoj ol post nuklea milito... Eble jam ekzistis aliaj inteligentaj specoj, kiuj elĉerpiĝis aŭ sindetruis, kaj tre verŝajne venos alia post ni malaperos, senrigarde al kiom da miloj da jaroj ĝi bezonos disvolvi inteligenton. Ni ne estu tiom arogantaj pensi, ke se homo malaperas, Tero malaperos.

Sanigaj krimoj

# Finaj franĝoj

Kiam ĉio kvietiĝis, Helnjo kaj mi jam tri monatojn kunvivis. Ni ne geedziĝis, sed nin kunigis ligo pli forta ol geedzeco: niaj sekretoj, nia kunkulpeco, nia krucmilito, nia kontribuo por fari ĉi tiun mondon io iom pli bona, malpli perversa, pli deca.

El ĉio ĉi mi akiris oran emeritiĝon, en ĉi tiuj tempoj, kaj mirindan virinon, kiu oficiale zorgis pri mi, sed kiun mi vere prizorgis. Ŝi ne plu laboris, kaj ni uzis nian tempon kaj monon por eligi Brendinon kaj Tomáson el la malliberejo, malliberigitaj pro du krimoj, kiujn ili ne faris.

Ni longe diskutadis ĉu ni devos provi eligi ilin el malliberejo ĉu ne, ĉar estis tre verŝajne ke post dek jaroj ili estos liberigataj pro bona konduto.

Fine ni metis la kazon en la manojn de advokata firmao de agnoskita prestiĝo en la urbo, kaj ni komencis viziti ilin. Ĉiujn du aŭ tri tagojn ni vidis ilin solaj kaj helpis ilin per mono kaj kuraĝigo. Ili eksciis pri *El Antro*, kaj ili ĝojegis, ke ili ne estis tie tiutage, sed en malliberejo.

Konsilite de niaj advokatoj, ni diris al ili, ke la plej rapida afero estus, ke ili ion studu kaj volontulos pri diversaj aferoj en la malliberejo, kaj tial ili baldaŭ iĝis fidindaj *geinternoj*, tiel, ke kvin jarojn post ekenkarceriĝo ili akiris *la trian gradon*, do ili povis hejmeniri kaj labori de lundo al vendredo. Estis tio, kion ni atendis.

La tagon kiam ili alvenis hejmen post kvin jaroj, ni iris viziti ilin.

«Vi faras bonan paron, majstro», ŝi diris al mi flanken.

«Ne, Brenda, vi ne estas Bajaderin' ĉi tie. Ĉi tio cidiru al mi ĝis mi diros al vi».

«Kiel vi deziras, Gervasjo. Sed Tomaso scias ĉion».

«Kion vi diris al li?»

«Ke mi sentis min tiel tiom malbone pro tio, kion li faris al mi, ke mi ankaŭ komencis frekventi *El Antro*n kaj ke mi havis majstron, kaj nun mi havas alian».

«Ĉu li scias, ke temas pri mi?"

«Jes».

«Maldiskretulino. Kaj kion li diris?»

"Ke estas logike, ke majstro volas eligi sian subulinon el malliberejo kaj dankas cin pro

tio, ke ci inkluzivis lin en la interkonsenton, ĉar ci povus lasi lin tie kaj liberigi nur min".

Mi silentis, ridetante. Helnjo tiam demandis:

«Kie estas Tomaso?»

«Li iris preni la drinkaĵonj».

«Mi diris al vi, ke ni mem alportos la manĝaĵon», mi insistis. «Ni alportis akvon».

«Jes, sed li prenos vinon».

Tiuj vortoj revenigis malbonajn memorojn.

Baldaŭ poste, Tomas' alvenis kun la vino kaj alkoholaĵoj.

´«Hej geamikoj», li diris brakumante nin. «Dankon, dankon, dankon pro revenigi nin el la infero».

«Ni faris nenion, Tomas'. La grava afero estas, ke vi estas ĉi tie».

«Jes, danke al vi du».

Ni tostis kaj manĝis tion, kion ni alportis. Ili provis meleagron kun tartara saŭco unuafoje en siaj vivoj, kaj trovis ĝin delikata. Ni alportis ĝin ĉar ĝi estas la plej ŝatata plado de Helnjo, kiun ŝi fakte kuiris tiun saman posttagmezon, sed ni manĝis ĝin sen kroma saŭco, ĉar ĝi havas komponanton, kiu pliigas streĉiĝon en tiuj el ni, kiuj emas al tio, kaj ĝi havas altan en vitamino K, kio estas malpermesita al Helnjo pro medicinaj kialoj, ĉar ŝi havas maloftan faktoron en sia sango kiu densigas ĝin per tiu vitamino. Nu, tion ni diris al ili por ne aldoni pli da saŭco ol la kuiraĵo jam havis.

Post la deserto, post kiam ni denove tostis per likvoro por la libereco, eĉ se ĝi estis kondiĉa, de niaj amikoj, estis Tomas' kiu alportis la temon.

«Kaj vi, Helnjo, ĉu vi neniam pensis esti mastrino? Mi vidas vin kun sufiĉe da decido kaj aŭtoritato por fari bone».

«Uf!», ŝi diris kun grimaco de abomeno, «pro kio? Tio estas perversa, Tomas'».

«Sed vi laboris ĉe El Antro!»

«Vi bone diris, Tomas': mi laboris. Ĝi estis nur laboro. Oni devas manĝi ĉiutage. Tuj kiam mi trovis alian postenon, mi rezignis, kvankam mi gajnis malpli.

«Ĉu malpli?", li diris surprizita. «Mi ĉiam pensis, ke vi foriris, ĉar vi gajnis pli multe ĉe la alia loko».

«Mi foriris ĉar ĉagrenis mi la klientaro».

«Sed vi estis tie du jarojn!»

«Jes. Ne memorigu min,

Tomas'. Mi devis manĝi ĉiutage, mi diras al vi. Tial mi estis tie, ne por io alia».

«Kompatindulino», mi diris, prenante ŝin je la brako.

«Nu, *El Antro* estas for nun», diris Brendin'.

«Ne. Ĝi iris en la Inferon».

«Vi pli bone ol iu ajn povas scii tion», diris Brenda. «Vi estis tie».

«Jes. Du bomboj eksplodis. Unu sub la stango, kaj alia je a pordo, sed ne interne, kiel dirite, sed ekstere, en rubujo».

«La ĵurnaloj diris, ke ĝi eksplodis interne».

«Tiaokaze, la fasado devus esti elfalinta, sed ĝi enfalis. Tiu, kiu skribis tiun artikolon estis malsaĝulo».

«Sed..., kiel vi scias tion?»

«Apenaŭ estis rubo ekstere. Preskaŭ ĉiu falis internen».

«Kial vi ne diris tion tiun tagon?»

«Ĉu mi, malgaja drinkejisto kontraŭdirante la arkitekton de la fajrobrigado? Neniel!»

«Sed ni scias, ke ĝi eksplodis en la rubujo, tiu, kiu estis fiksita al la muro, apud la enirejo», diris Helnjo, rigardante la horloĝon. Ĝi estis la interkonsentita signalo.

«Ĉu? Kaj kiel vi scias tion?»

«Ĉar mi surmetis ĝin».

Estis glacia silento. Ili ambaŭ estis tre trankvilaj, sed kun larĝaj okuloj.

«Nun restas nur ke vi diru al ni, ke tiu sur la stango starigis ci, Gervasjo».

«Tiel iris la afero».

«Kio?!», ili diris unuvoĉe. Ili pensis, ke Helnjo ŝercas, sed tiu ĉi ŝerco jam estis tro longa kaj ili komencis maltrankviliĝi.

«Jes. Mi metis ĝin», mi ripetis.

«Vi murdis pli ol ducent homojn tute konscie!»

«Ili estis perversuloj», diris Helnjo. «Ili estos pli komfortaj en Infero ol ĉi tie. Kaj tie ili damaĝos neniun».

«Vi gehundoj," diris Tomas', penante leviĝi, eble por bati min, sed li ne povis.

«Kaj ci», diris Brendin', «estas la knabino nigra kun la skimasko! Tiu, kiu mortigis Sendinon!»

«Evidente. Jes».

«Kaj ci donis al mi la sangmakulatan murdan tranĉilon, por

ke mi lasis sur ĝi miajn fingrospurojn..."

«Certe jes».

«Kial? Mi demandis min multfoje en malliberejo, kial iu volus vundi min?»

«Ĉar vi estas du perversuloj».

«Ne, vi ne eligis nin el malliberejo, vi metis nin en ĝin!»

«Mi...», diris Tomas' duonvekiĝante, «ĉu ci ankaŭ mortigis Silvinon?»

«Gervasjo», diris Helnjo. «Li mem faris ĝin. Ni ankoraŭ ne konis unu la alian».

«Jes», mi diris. «Kaj ankaŭ Erikinon, ŝia subulino. Ŝi vidis tro multe. Kaj krome ŝi ankaŭ estis perversa. Ŝi certe meritis morton».

«Kiel ci povis?—, Tomas' tondris.

«Nu, tio, kio devas esti farita, devas esti farita ĝuste."

«Sed vi mastras...", Brendin' komencis.

«En la pasinto. Mi fariĝis *dom* kolekti informojn.

«Kial...? Kial ci malamas nin?», demandis Tomas'.

«Ni ne malamas vin. Ni malamas perversecon. Se ni forigas perversulojn, perverso estas finita.

«Tio estas terura. Vi estas teruraj... vi estas...», diris Brendin antaŭ ol ekdormi.

«Brendin',″ Tomas' diris per eta voĉo. «Kio okazas al ni?»

«Endormu, Tomas'», diris Helnjo. «Dormu eterne. Dormu via perverseco kun vi».

Mi leviĝis kaj enlitigis Brendinon sur la sofon, kiun ni kunhavis ĝis tiam. Tomas' restis klinita malantaŭen, kvazaŭ meditante kun fermitaj okuloj, apogante sin al la dorso de la flugilseĝo.

Ni ĵetis la rubaĵojn en la rubujon kaj lavis la telerojn kaj manĝilaron. Ni lasis la kuirejon tiel pura, kvazaŭ neniu estis tie dum jaroj. Ni trairis la manĝoĉambron kaj zorge balais kaj ŝvipis la plankon. Poste ni prenis niajn aĵojn kaj la rubsakon. Ni eliris en la straton kaj forĵetis ĝin en la restujon sur la sekvan blokon. Ni alvenis al la domo de Helnjo kaj duŝis kune. Tiam ni kuŝiĝis kaj amoris.

«Estas agrable ne plu havi rubon hejme», diris al mi Helnjo antaŭ ol ekdormi.

Kaj ververe, ŝi pravis, ege.

Mursjon, la 24-an de majo 2014a

Fintradukite la 1an de julio de 2023a

Literaturo

# Defendo de HIspanio

*Ramiro de Maeztu*

## Necesa defendo

Ĉu Hispanio iam protestis kontraŭ ĉi tiuj malveraĵoj? Ĝenerale, ni lasis ilin cirkuli, sen preni la penon por ekscii. Sed ĉi tiu nescio estas senkonscio, kaj senkonscio estas formo de morto. La karakterizaĵo de la konscienco estas maltrankvilo, konstanta viglado, la ĉiama preteco defendi. Esti estas defendi. Maltrankvileco ne estas akcidento de la esto, sed ĝia esenco mem. La malnova latina fablo estas bone konata: "Estis Maltrankvilo, kiam li trapasis riveron kaj vidis argilan grundon, li prenis pecon da tero kaj komencis ĝin formi. Dum li pripensas, kion li faras, aperas al li Jupitero. Maltrankvilo petis de li infuzi la terpecon, kiun i formis per spirito. Jupitero faris tion volonte. Sed ĉar li intencis doni al la kreitaĵo sian propran nomon, Jupitero malpermesis lin kaj volis, ke ĝi portu la sian. La disputantoj vokis Saturnon, kiel juĝiston.Kaj Saturno, kiu estas tempo, juste juĝis: "Vi, Jupitero, ĉar vi donis al li la spiriton, vi prenos lian spiriton kun vi, kiam li mortos; vi, Tero, kiel vi donis la korpon, vi prenos la




korpon; vi, Maltrankvilo, ĉar ĝi muldis ĝin, ĝin posedos dum ĝi vivos. Kaj ĉar estas disputo pri la nomo, oni nomos ĝin "homo", la homo, ĉar li estas farita el "humus" (nigra tero).


Vivi estas miri pri esti en la mondo, sentiĝi stranga, pleniĝi

de angoro antaŭ la eventualaĵo ĉesi esti, kompreni la konstantan probablecon misvagi, la bezonon amikiĝi inter niaj amatoj, la eventualaĵo. ke ili fariĝu malamikoj, kaj esti atentaj pri la aŭtenta kaj la falsaĵo, la vero kaj la eraro. Maltrankvileco ne estas akcidento, okazas al iuj kaj ne al aliaj. Ĉi tio estas la esenco mem de nia estaĵo. Kaj koncerne la patrujon, tiom kiom la patrujo estas spirito kaj ne tero, ĝi estas esti mem. Nia malkvieto rilate la patrujon estas, verdire, ĝia kvintesenco. Estas ni, kaj ne ŝi, kiuj devas vivi sur gardostaranto; ni devas antaŭvidi la danĝerojn, kiuj embuskas por ĝi, senti por ĝi la kosman angoron, per kiu ĉiuj vivuloj sin defendas kontraŭ la morto, gardi ĝian honoron kaj bonan reputacion kaj ripari, se necese, la senzorgecon de aliaj generacioj.

Ne estis nur nia humileco, sed neglektemo, la kialo, kial la ekumena sento de Hispanio estis forviŝita de nia spirito. Nia neglektemo kaj agado de niaj malamikoj. Mirabeau malkovris en la Nacia Asembleo, ke la famo de Ludoviko la 14-a ŝuldiĝis plejparte al la 3 414 297 frankoj (kalkulitaj kun la rapideco de 52 frankoj po arĝenta marko), kiujn li disdonis inter eksterlandaj verkistoj por ke ili povu proklami liajn meritojn. Louis XIV certe estis la plej obstina kaj kruela malamiko kiun Hispanio iam havis. Samtempe, kiam li metis sian nepon sur la tronon de Madrido, li sekrete diris al sia heredanto en siaj "Instrukcioj al la Daŭfeno": "La stato de la du kronoj de Francio kaj Hispanio troviĝas tiel unuiĝinta, ke ĝi ne povas kaj ne povas levi la unu sen kaŭzi damaĝon al la alia". Aliflanke, li klarigis al sia filo la kialon de esti helpinta Portugalion, post kiam li engaĝiĝis al Hispanio ne fari tion, dirante ke: "Dum forĵetante la plenumadon de la traktatoj laŭlitere, ili ne estas strikte malobservitaj." La tezo de Ludoviko la 14ª estas malvera. Ne malutilas Hispanion, ke Francio estas forta. Kio domaĝus al ĝi, se ĝi estus tiel malforta kaj malantaŭa kiel Maroko. Nek Francio perdis ion pro la forto de Italio, nek ĝi estus malfortigita de la potenco de Hispanio. Sed Donoso Cortés ankoraŭ devis respondi al franca publicisto, kiu certigis, ke la intereso de Francio konsistis, ke Hispanio ne eliru el sia senpoveco, por ne devi prizorgi Pireneojn okaze de batalo kun Germanio.

Ĉi tio estas troigita, kaj ĉio, kio estas troigita, estas sensignifa, diris Talleyrand. Se ne ekzistus internacia politiko krom malfor-

tigi la najbaron, kiel Thiers asertis, la tuta politiko baldaŭ malaperus, ĉar la najbaroj konspirus kontraŭ la nacio, kiu faris ĝin, kaj la mondo malkomponus en la milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. La defendo de la patrujo ne ekskludas, sed postulas, respekton de la rajtoj de aliaj patrujoj. Sed pardonpeto ne estas troigita krom kiam ĝi estas farata troige. Ĝi estas tiel esenca por la institucioj de la Ŝtato kaj por la valoroj de la nacio kiel por la vivo de la Eklezio. Se ĝi ne estas daŭrigata, institucioj falas kaj popoloj pereas. Ĝi estas pli grava ol la armeoj mem, ĉar glavoj estas svingitaj per siaj kapoj, kaj ne inverse. Ĉi tio, ke ĉi tie komenciĝis la "Hispana Agado", kiu estas la defendo de valoroj de nia tradicio, estas kio devus esti, en ĉi tiuj du jarcentoj, la ĉefa engaĝiĝo de la Ŝtato, ne nur en Hispanio, sed en ĉiuj hispanilandoj. Bedaŭrinde ne estis. Ni ne sufiĉe defendis nin. kaj nun ni estas pro la favoro de la ventoj.



# Plej vasta grando de la Imperio Hispana:

Ĝi estis la plej vasta en la konata homa historio: vidu, ke la portugala imperio (blua) disvastiĝis laŭmarborde, dum la hispana entenas centojn da kilometroj enlanden. Tio estis sekvo da la intermiksiĝado de hispanoj kaj indiĝenoj, kio daŭris ĝis nun: ne interesis al hispanoj forpreni riĉaĵojn kaj fuĝi pere de bonaj kaj proksimaj havenoj, sed kopii Hispanion en tiujn landojn, kaj sekve indiĝenoj estis hispanoj dekomence, ne koloniitaj homoj. Male faris aliaj eŭropanoj en Ameriko kaj Afriko, ĉar ili konsideris, ke indeĝenoj estis bestoj.

Politiko

# Julion 23an

Ĉijare oni povos voĉdoni ne je decembro, sed je julio, pro la persona decido de unu homo: la Prezidento de la Registaro de Hispanio.

Ŝajnas, ke ne plaĉis al li la rezultoj de la lastaj balotadoj kaj aŭtonomaj kaj urbaj en Hispanio, kaj nun li decidis venĝi tiun ofendon, kiun la loĝantoro faris ne voĉdonante lin kaj iajn politikojn. Sed tio estas nur unu grado pli en lia koncepto, ke Hispanio apartenas al li.

La afero, ke la prezidanto de Hispanio la tutan povon en siaj manoj estas fakto, sed ankaŭ la certigo pri tio, ke ne ekzistas demokratio en Hispanio. Fakte ĝi neniam ekzistis, kaj eble neniam venos. Ni suferis —laŭ historio— absolutismajn reĝojn, eleksterlandajn invadojn, kruelajn militojn, kaj multe da koruptaj kaj stultaj regantojn. Ili agis kvazaŭ la lando apartenis al ili. Sed tio ne plu validas.

Hispanio apartenas al hispanoj. Tio ŝajnas evidentaĵo, ĉu ne? Kial proklami tion nun? Nu, Diktatoro Franko diris iam, ke Hispanio apartenis al li pro tio, ke li venkis la militon. Sed Sánchez venkis neniun militon, cu? Anstataŭ, li perfortis la Hispanan Konstitucion, kiel la Tribunalo diris antaŭ nelonge. Dum la pandemio li proklamis Alarmstaton, sed fakte la disponoj de la Prezidento estis reala Sieĝstaton. Kaj tio estas kontraŭleĝa. Iama diktatoro Franko faris simile —li proklamis leĝojn kaj agis senlime—, sed li diris, ke li ne estas demokrato.

Prezidento Sánchez, male, proklamas, ke li defendas demokration. Ankaŭ li diras, ke li estas progresemulo, kaj ke se *ekstremodekstro* venkas, venos katastrofo, kaj niajn rajtojn oni forprenos. Sed mi demandas, kiu defendos niajn rajtojn el Prezidento Sánchez...



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/hale/kels128.pdf

Numero 128- julion de 2023a

## MEMORU:

Kvankam mi konsilas ne tion fari, se vi estas konscia civitano, kiu komprenas, ke vi bezonas baloti, ne kuraĝu fari tion sen legi la programojn de la koncernaj partioj, tiel ke poste vi povos plenrajte aserti ĉu la venkinta partio mensogis, trompis, ĉu plenumis tion, kion ĝi promesis. Jen la lokoj, kie vi trovos la ĉefajn programon:

1 PP: http://www.gazetoteko.com/programoj2023/PP112.pdf

2 PSOE: http://www.gazetoteko.com/programoj2023/PSOE272.pdf

3 SUMAR: http://www.gazetoteko.com/programoj2023/SUMAR185.pdf

4 VOX: http://www.gazetoteko.com/programoj2023/VOX177.pdf

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88

**Ni pridiskutos la rezulton de la balotado je la venonta numero.**